

La Brita Esperantisto

Majo – Junio 1979

Praktika Bildvortaro de Esperanto



La

Brita Esperantisto

THE BRITISH ESPERANTIST

ELDONAĴO DE BRITA ESPERANTO-ASOCIO

75a Jaro, N-ro 829

Majo-Junio 1979

Eldonas:

LA BRITA ESPERANTO-ASOCIO, 140 Holland Park Avenue, LONDON
W11 4UF

Redaktoro:

WILLIAM AULD

20 Harviestoun Road, DOLLAR, Skotlando FK 14 7HG

Reklamoj: £20 por tuta paĝo, kaj samtarife (plus 15%) ĝis okona paĝo. Unu senpaga el tri.

Nek la Asocio nek la Redaktoro respondecas pri la personaj opinioj esprimitaj de kontribuintoj al la revuo, kondiĉe ke la esprimoj ne estas kontraŭlegaj.

UK ISSN 0007-067X

Form of Bequest

I give and bequeath (free of duty) to Esperanto-Asocio de Britujo whose present address is 140 Holland Park Avenue, London W11 4UF, the sum of £..... to be used for the general purposes of such Association. And I direct that the receipt of the Secretary for the time being of the Association shall be a sufficient discharge to my Trustees for such a legacy.

STAFF HOLIDAYS

The Office will be closed from

Monday 13th – Friday 24th August (inclusive)

Please avoid sending any correspondence during this period.

Thank you.

PRI LA 63-a KONGRESO, CHELTENHAM

Vendredon la 13-an: La kongresanoj envenas, kiel konstanta fluo, la Akceptejon, kiu troviĝas en ĉambro de la Hotelo Queen's, kaj ĉe la fono de tiu ĉambro troviĝas trinkejo. Diable bona ideo! Mi lasas la tornistran en angulo sur la planko, aĉetas trinkaĵon kaj dum malsoifigado legas la programon. Sur la unua paĝo aperas la bonveniga letero de la Urbestro, dirante ke BEA fondiĝis antaŭ cent jaroj! Ne estas tempo por trinki duan glason ĉar la LKK'a Prezidanto Wilfrid Appleby jam pretiĝas por malfermi la Kongreson. Li malfermas ĝin per parolado menciante la antaŭajn kongresojn en Cheltenham sed diras nenion pri la grupo de polaj vizitantoj nek la aliaj ne-britoj, kiuj troviĝas en la Kongreso. Post la malfermo mi iras por vespermanĝi kaj maltrafas la prelegon pri konkoj, kiu sekvas la malfermon. Kiam mi revenas al la Hotelo la Gloucester Grand Opera Group jam komencis la prezenton de "Gemoj de la Opero". La prezento estas du-hore longa kaj post la unua horo iuj anoj, kaj mi, trafas la okazon de la paŭzo por resti en la Akceptejo trinkante kaj babilante. La "Disko" anoncita en la programo ne okazas, do baldaŭ post la fermo de la trinkejo miaj amikoj kaj mi foriras al niaj dormejoj.

Sabaton la 14-an: Ni iras al la Urbodomo kie funkcias la Kongresejo. Estas, ĉefe, tago de fakaj kunsidoj. Je la mateno William Auld donas sian unuan prelegon pri "Interna Ideo kaj Eksteraj Rilatoj". Vespere antaŭ la balo li legas poemojn interplektitajn per orgenmuziko. Kaj de la oka horo ĝis la noktomezo okazas la Balo, laŭ invito de la Urbestro. La ĉambro estas simpatie lumigita, la muziko bona kaj la bufedo sufiĉas por malsatigi la samideanojn.

Dimanĉon la 15-an: Post la Diservo kaj antaŭ la Jarkunveno de BEA okazas la dua prelego de William Auld pri "La Miraklo de UEA". Ĉi tiu prelego estas tre interesa al mi, ĉar ĝi skizas, iom mallonge kompreneble, la historion de UEA.

Sekvas la jarkunvenoj de BEA kaj E-AB. Per ĉi tiuj jarkunvenoj la membraro akceptas la bonfaran asocion E-AB kiel la estonta ĉefa asocio dum BEA daŭros kiel komerca kompanio. Mi esperas ke ĝi lernos komerci, ĉar dum la Kongreso evidentiĝas, ke estas almenaŭ kvar librovendantoj, aŭ eĉ vendistoj, kiuj konkurencas kun BEA. Tamen la konkurenco ne malaltigas la prezojn! Ĉu venontjare vidos ni pli da librovendantoj kaj eble ankaŭ prezan konkurencon?

Tiu kiuj ne laciĝas ankoraŭ, dum la vespero povas rakonti anekdotojn en la ero "Mi Memoras" kaj aŭskulti prelegon pri "La Historio de la Cigaredkartoj". La Distra Vespere havas fortan kulturalan guston, kun muziko kaj kantado de la floro de la Londona Klubo. Ankaŭ aperas magiisto, kiu ne parolas E-on, kaj kies magio ne estas tre forta kaj li bezonas 20 minutojn por malaperigi sin. La lasta anonco de la vespero diras ke la promesita "Disko-sono" estas nuligita. Denove seniluziigo.

Lundon la 16-an: Tago de ekskursoj. Oficiala bufeda vespermanĝo kun la Urbestro kiel gasto de la Kongreso. Kaj poste koncerta prezento de "La Piratoj de Penzance" en traduko de Reto Rossetti. Kantas la opereton la Gloucester Grand Opera Group, al kiu kunigas la floro de la Londona Klubo. La kantado estas tre bona, kaj elstara tiu de Janet Higgins kiel Magda. Brila fino por la 63-a!

Oni ne povas fini ĉi tiun raporton ne menciante la nomon de la LKK'a Sekretario, Walter Hawkins, kiu devis fari la laboron de tri aliaj membroj, kiuj pro diversaj kaŭzoj foriris la urbon baldaŭ antaŭ la Kongreso.

Lastaj komentoj: Ne estis facile trovi malfermitajn restoraciojn en Cheltenham dum la vespero, kaj la LKK ne povis doni informon pri manĝejoj al enketantoj. Ĉu eblos provizi ĉi tiun informon en venontaj kongresoj? Kaj ankaŭ, mi petas, ke la programo de vendredo vespere ne estu tre longa, ĉar oni volas sidi kaj paroli kun amikoj, ĉefe se trinkaĵoj estas akireblaj!

Andreo Sidworth.

LA SUPERAJ EKZAMENOJ PRI ESPERANTO

Kelkaj membroj de BEA, sukcesintaj akiri la Altgradan Diplomon de la Asocio, sendube volus daŭrigi sian studadon, kaj pruvi sian atingon per supera diplomo. Eble ne ĉiu tia membro scias pri la ekzisto de la ekzameno por la Licenciata Diploma de BEA kaj de la Internacia Ekzameno de UEA.

Ĉar neniu vere serioza studento de la lingo devus kontentiĝi sole per la akiro de la kvalifiko DBEA, ŝajnas utile, ke oni ĉi tie skize priskribu la postulojn de la du menciitaj superaj ekzamenoj.

Licenciata Diploma de BEA

La ekzamenon oni okazigas laŭ la bontrovo de la Licenciata Komisiono, laŭeble dum la jarkongreso de BEA. La okaziganto oni anoncas almenaŭ tri monatojn antaŭe en *Brita Esperantisto*.

Kiu ajn esperantisto rajtas prezentiĝi por la ekzameno, ĉar ne estas necese, ke kandidato jam antaŭe posedu alian diplomon. Por certigi, tamen, ke lia lingvoscio atingis sufiĉe altan nivelon, la kandidato devas sendi al BEA kvar semajnojn antaŭ la anoncita dato de la ekzameno provan tezon, kiu devas esti originala verko pri kiu ajn temo, enhavanta proksimume mil vortojn. La Licenciata Komisiono allasas la kandidaton al la ekzameno nur se la lingva kvalito de la prova tezo estas kontentiga.

La ekzameno konsistas el Skriba kaj Parola Partoj. La Skriba Parto ampleksas demandojn pri la literaturo kaj gramatiko de Esperanto, pri literatura stilo, kaj pri la historio de la internacilingva movado, kaj demandojn postulantajn scion pri komercaj kaj teknikaj terminoj. Necesas ankaŭ traduki anglan tekston en Esperanton.

En la Parola Parto la kandidato konversacias kun la ekzamenanto, precipe pri la esperanta literaturo kaj historio kaj pri esperantista vivo. Li devas paroli la lingvon flue kaj bonstile kun gramatika precizeco kaj bona prononco; krome li devas parole traduki en Esperanton mallongan anglalingvan tekston.

Por sukcesi la kandidato devas ricevi 60% el la maksimumaj poentoj en ĉiu el la du partoj; 80% rajtigas la aljuĝon de "sukceso kun honoro". Sukcesa kandidato estas nomata Licenciato de la Brita Esperanto-Asocio (LBEA).

Pliajn detalojn pri la ekzameno oni povas ricevi ĉe BEA.

Internacia Ekzameno de UEA

Tiun ekzamenon oni okazigas aŭ en ligo kun Universala Kongreso, aŭ kun Antaŭkongreso aŭ Postkongreso, sed ankaŭ en ligo kun aliaj internaciaj konferencoj, kursoj, seminarioj, k.s. sub la aŭspicioj de UEA. Krome la Internacia Ekzamena Komisiono povas rekomendi al la Estraro de UEA, ke la ekzameno okazu en alia loko. Ĉiu ekzameno devas esti anoncita en la revuo *Esperanto* ses monatojn antaŭ la okazigo.

Kandidato devas pruvi, ke li finis per diplomigo minimume mezgradan lernejon kaj ke li plene posedas Esperanton. Pri la unua punkto oni devas prezenti esperantan tradukon de la diplomo; la ĝustecon de la traduko devas konfirmi kompetenta instanco aŭ alĝinta landa asocio. La duan postulon oni povas plenumi per prezento de atesto pri sukcese plenumita supera ekzameno en la propra lando, per premiigo en belarta aŭ oratora konkurso, aŭ per skriba konfirmo de du konataj esperantistoj.

La ekzameno ampleksas skriban parton, parolan parton, kaj prezenton de disertacio.

La skriba parto konsistas el demandoj rilate la lingvon, la literaturon, lingvistikon kaj interlingvistikon, la historion kaj organizon de la movado, kaj la didaktikon kaj instrumentojn de Esperanto. La kandidato devas respondi al kvar demandoj pri tiuj temoj, mem elektante el naŭ prezentitaj demandoj.

En la parola parto la Ekzamena Komisiono ekzamenas la kandidaton pri ĉiuj ekzamenaj temoj. Poste la kandidato faras provlecionon antaŭ la Komisiono pri temo anoncita al li almenaŭ kvar horojn antaŭ la ekzameno.

Kandidato sukcese plenuminta la

skriban kaj parolan partojn proponas temon por disertacio rilate unu el la ekzamenobjektoj, el 8,000 ĝis 10,000 vortoj, kun bibliografio.

En ĉiu parto de la ekzameno la aljuĝo povas esti: “nebona”, “bona” aŭ “tre bona”, kaj kandidato povas ricevi aljuĝon de “sukceso”, se li ricevis prijuĝon “bona” aŭ “tre bona” en ĉiu parto, kun aldona noto pri tiu(j) parto(j) en kiu(j) li ricevis la prijuĝon “tre bona”. Kiu ricevis la prijuĝon “tre bona” en ĉiu el la tri partoj ricevas la aljuĝon “sukceso kun laŭdo”.

Sukcesa kandidato ricevas diplomon, kies titolo estas “Internacia Diplomo pri Supera Instrukapablo de la Internacia Lingvo Esperanto”.

Pliajn detalojn pri la ekzameno oni povas ricevi ĉe Mag. William Auld, 20 Harviestoun Road, Dollar, Skotlando, FK14 7HG.

Alec Venture

NEKROLOGOJ

**KATHLEEN (“BOBBY”) CLAMP,
1904-1979**

Kun profunda bedaŭro ni sciigas pri la morto, okazinta la 2-an de februaro 1979, de unu el la veteranoj de la londona esperanta movado.

Bobby fariĝis membro de la Londona Esperanto-Klubo kaj de la BEA jam en la jaro 1921. En sia junaĝo ŝi laboris en la oficejo de BEA, helpante la tiaman sekretarion, Montagu Butler, kaj tiam ŝi lernis uzi la stenografian sistemon de Pitman laŭ la adapto farita por Esperanto (de Butler). Ŝi estis kaj restis lerta stenografistino; ankoraŭ dum la Universala Kongreso en Londono (1971) ŝi povis multe help al la KKS pro tiu sia kapablo, tre malofte trovebla inter la esperantistoj.

Ŝi restis fidela membro de la Londona Klubo ĝis sia morto, kaŭzita de falo pro la glitiga trotuaro en tiu periodo de frostado. Ĉiuj klubanoj konis ŝin kiel ĉiam helpeman amikon. Ŝin karakterizis la volo resti en intima kontakto kun multaj iamaj membroj, kiuj — pro malsano, maljunaĝo aŭ alia kaŭzo — ne plu povis resti aktivaj esperantistoj.

Bobby ĉefe respondecis pri la organizado de la Kristnaskaj Foiroj de la Klubo en 1955-1957. Ŝi estis kelkajn jarojn membro de la kluba Konsilantaro, kaj dum 1962-1964 ŝi reprezentis la Klubon kiel ĝia delegita konsilanto ĉe BEA.

Ni esprimas profundan kondolencon al ŝiaj parencoj kaj ŝiaj amikoj.

Parker. S-ino Eva Parker, el Burnley, la vidvino de s-ro Fred Parker, mortis en Aprilo. Ŝi estis membro de BEA kaj fidele servis la Nord-Okcidentan Federacion kiel librovendistino dum multaj jaroj. Ŝi tre ofte akompanis sian edzon al Universalaj Kongresoj. Ni tre bedaŭras ŝian forpason.

Steel. Charles Steel mortis la 1-an de Aprilo, 1979 en Kirk Michael, Mankinsulo kie li estis Del. de U.E.A. Fidela laboranto por Esperanto dum multegaj jaroj. F.B.E.A. de post 1921.

KVAZAŬ KVIZE . . .

Nu, kiu esperanta fakasocio fondiĝis en 1908 sub la unua prezido de L. N. Tolstoj? (Ne, vi ne trovas la respondon en la Jarlibro de U.E.A., nek en ‘Historio de la Lingvo Esperanto’ de Privat, nek en la Enciklopedio, nek eĉ en ‘Esperanto en Perspektivo’.) Kio, do, estas ĉi tiu ankoraŭ ekzistanta, mistera asocio, pri kies origino kaj nuna ekzisto restas neniam spuro en niaj plej fidindaj referencaj verkoj?

Jen, mi rakontos al vi: antaŭ nelonge venis en miajn manojn ‘Esperantista Vegetarano’, la alloga 28-paĝa mimeografita bulteno de *Tutmonda Esperanta Vegetara Asocio!* La enhavo, kvankam ‘faka’, estas sufiĉe varia kaj interesa kaj inkluzivas artikolojn, novaĵojn, leterojn kaj eĉ poemojn el la plej diversaj mondpartoj. La bulteno ŝajne aperas kvaronjare kaj la kotizo estas libervola. Por ricevi provnumeron skribu al la brita peranto, S-ro Paul Shackley, 31 Ridge Street, Lancaster, Lancs.

D. G. Hill.

Du Naivuloj en Ok Landoj (fino)

TRA LA LANDO DE DRAKULO

La Universala Kongreso bele evoluis. La duan tagon prosperis al ni trovi restoracion ĉe la Nigra Maro, kie la kelnero prefere parolis la anglan. Forflugis niaj timoj pri tutsemajna malsatado!

Malnovajn kaj novajn amikojn el multe da landoj ni renkontis, ĉiam interŝanĝante informojn kaj kongresnumerojn. Fine, post unu semajno ni aĉetis la lastajn memoraĵojn, pakis valizojn, kaj foriris. Rumanujo, la lando de Drakulo, alvokis nin.

Grafo Drakulo, la Vampiro, estas bone konata tra tuta okcidenta Eŭropo pro la romano de Bram Stoker. Multe da filmoj el Holivudo (Hollywood) vulgarigis la fikcian koncepton. En Rumanujo la originala Drakulo vere ekzistis. Rumanlingve lia nomo signifas *La Drako*, pro membreco de ordeno nobela. Tie oni pli bone konas lin per lia nomo, **Vlad** Palisumanto (the Impaler), pro ŝatata amuzo lia. Kruela li certe estis, sed ĉar li baris Rumanujon al la turkoj, kiam Bulgarujo, Grekujo kaj aliaj landoj venkiĝis, li iĝis kaj ankoraŭ restas nacia heroo. Ĝis antaŭ ne longe la rumanoj tute ne sciis pri la vampira kalumnio. (Nun ili turisme profitas)

Laŭ antikvaj legendoj vampiroj troviĝas en la Karpataj Montoj, kaj Toĉ decidis konduki rekte tra tiuj altaĵoj. Dank' al Dio pro tio, ke li decidis trapasi ties mallarĝajn valojn dum taglumo!

La vojaĝo al la bulgara landlimo ne estis tute seneventa. Ĝuste tiun tagon Toĉ malsaniĝis. Lia stomako spasme kramfis. Ĉu grava malsano, aŭ nur koliko (colic)? Li ege turmentiĝis.

“Mi dubas ĉu mi povos ŝofori,” li diris.

Mi panikis. Inter ni kaj niaj hejmoj estis pluraj miloj da kilometroj. Ni estis en preskaŭ senhoma regiono, kie la

indiĝenoj kondukas azen-ĉarojn, kaj kuracistoj loĝas longe for. Mi ne havas konduk-permesilon. Mi proponis, tamen, mem konduki.

“Sed se policano deziras kontroli niajn dokumentojn, eble ni fintrafos en bulgaran karceron,” Toĉ opiniis. “Mi faros laŭeble.”

Ni venis al Danubo; ne al la amika rivero de Beogrado kaj Novi Sad, nek al la legende blua vals-rivero de Vieno; sed al grandega, impona fluaĵo, larĝa je kvaron-kilometro. Oni iras en Rumanujon trans la Ponto de Amikeco. Ĉe ĉiu ekstremo staris armitaj soldatoj. Arbaregoj salutis nin de trans tiu sama rivero, kiu obstrukcis kaj romiajn legiojn kaj la turkan armeon.

Ĉe la landlimo, problemo. La rumana lingvo ŝajnas miksaĵo inter Esperanto kaj la itala. Facile ni povis kompreni la vojsildojn kaj anoncaĵojn. Sed eĉ ne unu vorton ni scipovis paroli.

Oni irigis gigantan flar-hundon tra ĉiu veturilo por serĉi kaŝitajn narkotaĵojn. Tuj poste doganisto scivolis pri bobeno da kin-filma negativo. Li provis malfermi la kaseton por kontroli. Konsterniĝo! Toĉ agitatiĝis. Subita inspiro! Mi *inventos* rumanecan lingvaĵon. “*Filma di Kongressa!*” mi kriis. Li tuj komprenis, kaj remetis la filmon!

Nun al la hotelo, kie strat-bubaĉo petis monerojn, kriante kaj piedminacante al ĉiu rifuzinto. La hotelo estis ‘porturista kaptilo’, kun milionulaj prezoj en la drinkejo. Mi sola eliris, kaj bone manĝis rumanajn pladojn. Tion mi faris per helpo de france parolanta rumano. Li konsilis pri la menuo, kaj poste gvidis min al bierĝardeno. Mi revenis al la hotelo. Toĉ iom resaniĝis post sia fastado, kaj kune ni esploris la stratojn de Bukareŝto, kaj trinkis malvarmigitan kafon.

Dume, en nia hotelo du aŭtoĉaroj da hispanaj turistoj parolis pri morgaŭa vizito al la tombo de Drakulo (ĝi ekzistas!), kaj aŭdis tiel-nomatan *ciganan trupon*, kies sovaĝaj kriegoj eĥis tra la stratoj.

Al Szeged en Hungario, kie ni paneis la solan fojon dum la vojaĝo. Dek-

centimetra rumana najlo estis krevinta pneŭmatikon. Nun, tamen, ni estis en parto de Eŭropo, kie oni bele nutras sin eĉ ĝis frumatene. La vespermanĝo estis perfekta. Sole unu afero mirigis nin—oni metis sur la tablon du botelojn. Jen la anglalingvaj etikedoj: Worcester Sauce, kaj Heinz Tomato Ketchup. Oj ve! ĉu por ĉi tio ni vojaĝis kvin mil mejlojn?

Kaj nun en Aŭstrujon, kie ni trovis etan gastejon ekster Linz. Kiel facile estis! La leĝoj, la kutimoj, la veturiloj, ĉio estis familiara. Ni manĝis, kaj je la naŭa horo vespere kolapsis en la liton, kie ni profunde dormis ĝis la oka matene. Nur tiam ni konsciis kiom lacaj ni estis antaŭe. Ni kalkulis. Ekzemple, en nur unu tago ni veturis preskaŭ mil kilometrojn tra montoj kaj valoj. Ĉar ni ne iris en karavano kun gvidisto ni devis paroli, se nur iomete kaj aĉe, plurajn lingvojn. Fine kaj korpo kaj menso venkiĝis.

Morgaŭ al Kolonjo. Poste al la Eŭroporto proksime al Roterdamo. Tranoktado en ŝipo. Hull, kaj jorkŝira pluvado. La lastaj montetoj, kaj ni finis nian kvin-mil-mejlan rondiron en Manĉestro sub brila kaj brula suno. Ni disiris, kaj malpakis, ĉiu en sia hejmo.

Tiun vesperon, ankoraŭ avidaj al alilandadoj, ni manĝis kune en ĉina restoracio—per manĝbastonetoj.

Laste, kaj por certigi al ni, ke niaj aventuroj finiĝis, ni vizitis nian plej ŝatatan drinkejon—tipe anglan—kaj per mane pumpita angla biero tostis unu la alian—“Al la pasinta Universala Kongreso de Esperanto, kaj al multaj, ja multaj aliaj!”

Don Lord

Geoffrey Chaucer

RAKONTOJ DE CANTERBURY

La Somnero

Somnero nian bandon akompanis;
Kerubvizaĝo lia ruĝe flamis,
Kovrita per amaso da pustuloj.
Mallarĝe interspacis la okuloj;

Li ja malĉastis kun pasera ardo.
Tre favaj liaj brovoj kaj la barbo;
Infantimiga estis la vizaĝo.
Ne helpis litarĝiro aŭ hidrargo,
Kaj ne sulfuro aŭ tartar' acida.
Ungvent' nenia, morda aŭ puriga,
Lin povis liberigi de l'pustuloj,
Aŭ lin kuraci de la karbunkoloj.
Poreon, ajlon, bulbojn li tre ĝuis,
Kaj kiam sange ruĝa vino fluis,
Babilis li kun tia voĉ' kriega,
Ke li impresis kiel hom' freneza,
Kaj se sufiĉis la inspiro vina,
Parolis li en lingvo nur latina.
Diraĵoj liaj estis nur areto
Parkere akirita el dekreto.
Ĉu strange? Li ĝin aŭdis ĉiutage.
Eĉ instruebla birdo nur papage
Ekkrias “Valt!” facile kiel papo.
Sed pruvus plua serĉ' en lia kapo,
Ke elĉerpigis jam la tuta scio.
Jes, “Questio quid juris” lia krio.
Li estis komplezulo tre fripona;
Troviĝis ja neniu tiel bona.
Al kamarad' doninta al li vinon
Li pruntedonus sian konkubinon
Por unu jar' kaj lin pardonis tute.
Li poste reprovizis sin laŭguste.
Se trovis li pekulon en plezuro,
Li lin instruis fronti sen teruro
Malbenon de la ĉefa diakono:
Ne loĝu la animo kun la mono,
Ĉar tra monujo venos punatako.
“Infer' ĉefdiakona—la monsako!”
Sed certe li mensogis sen skrupulo;
Malbenon devas timi la kulpulo.
Ĝin povas sekvi ekskomunikado,
Sed per absolvo venas nia savo.
Sub zorgo havis li por instrukcio
La gejunulojn de la eparkio;
Li gvidis ilin kaj sekretojn konis.
Girland' sur lia kapo ŝerce tronis.
Ĝi estis granda, kaj por plua blago
Li faris por si ŝildon el kukaĵo.

Trad. W. B. Johnson

Somnero: Oficisto kiu vokis kulpulojn al eklezia juĝejo.
“Questio quid juris” La demando estas, kiu parto de la leĝo (aplikiĝas).
“Valt!”: Oni instruis al garoloj ekkrii “Watte” (Walter) kiel papagoj nun krias “Poll”.

LAŬ MIA OPINIO . . .

Tro angla?

D-ro Goodheir malŝatas la efemerajn verketojn de Alariko kaj mi. Alarikon li senhezite nomas "tedulo", kaj min "tedulo" kaj "seninteresa stultulo". Vidpunkto, se iom krude prezentita. Sed kiam li plendas ke *Brita Esperantisto* estas "iom tro Brita", espereble li ŝercas! Estas mil spicoj en la mondo. Ĉiu nacio donu la sian al la universala bankedo! (Eble al la frisa d-ro Goodheir tutsimple ne akordas kelkaj aspektoj de la 'brita' karaktero. Ĉu simile malplaĉas al li la japaneco de japanoj, aŭ la poleco de poloj?)

Estas tre facile nur ataki kaj plendi. Vi, kompatinda Redaktoro, ne povas presigi tion, kion vi ne ricevas. D-ro Goodheir estas konata klerulo. Eble li bonvolos provizi filozofiajn artikolojn de nivelo aprokata de li. Sed mi avertu lin. Li riskos, ke oni nomos lin "tedulo". Verki en la verda medio estas danĝere. Krokodiloj abundas.

Bonhumore kaj (senhonte) brite via,
Don Lord

Leginte la artikolojn de Edwin de Kock kaj Alariko en BE (Nov/Dec), mi duon-intencis skribi laŭde pri ambaŭ. Kompreneble tiu "duone" ŝrumpis ĝis nulo, sed nun akra atako kontraŭ Alariko kaj Don Lord persone, kaj humuro ĝenerale, instigas min al defendo.

Kiel utilas varbi homojn al la Movado se ni tuj fortimigas ilin per elitismo — donas la impreson, ke Esperanto estas io aparta de la ĉiutaga vivo, taŭga nur por altpensuloj? Humuro estas necesa

ingredienco de ĉiu kulturo, kaj se la tono de BE fariĝas pli vulgara, des pli bone.

Daphne Lister

NASKIĜO

Fantom. Heleno kaj Ian Fantom anoncas la alvenon de sia filo Gavan Trevor je la 19a de aprilo 1979, kun pezo de 3,64 kg.

SOMERLERNEJO ESPERANTA

La 19a sesio de someraj Esperanto-kursoj en Barlastono okazos ĉisomere de la 25a ĝis la 31a de aŭgusto. Kiel kutime, la sidloko de la kursoj estos Wedgwood Memorial College, Barlastono, apud Stoke-on-Trent, kaj ili estos aranĝitaj laŭ tri niveloj: komencantoj, progresintoj, spertuloj. La Direktoro de la Lernejo estas Dro Marjorie Boulton. Detalojn kaj aliĝilojn oni povas ricevi de: The Secretary, Wedgwood Memorial College, Barlaston, Stoke-on-Trent, ST12 9DG, Anglujo.

FOLKLORAJ BILDKARTOJ

Esperanto-grupo en Budapeŝto starigos ekspozicion, en kies kadro oni prezentos sur koloraj bildkartoj naciajn kostumojn kaj folklorajn kutimojn de ĉiuj landoj. La ekspozicio simbolos la interpopolan amikecon. Vi povas kontribui al tiu ekspozicio, sendante tiajn bildkartojn (kiujn la aranĝantoj dankos per similaj bildkartoj hungaraj) al: Dobos Ferenc, Jósika u.14, H-1191 Budapest, Hungarujo.

Support the Esperanto Movement's own Travel Agency by making all your Cross-channel Ferry bookings with us. Speedy and efficient service.

Esperanto Holidays Association,
Nacton, Ipswich.
Telephone: 0473-79300

ANSTATAŬ PARDONPETO

Estas fakto, ke en la BE ni dediĉas iom multe da spaco al recenzoj, kaj ne al ĉiu leganto tio plaĉas. Tamen ni obstine daŭrigas tiun politikon. Jen kial:

Ŝajnas al ni, ke la libro-eldonado estas speco de vivsango por la lingvo Esperanto kaj la movado esperanta. Libroj, finfine, estas konkreta manifestacio de la daŭra uzateco kaj progreso de la lingvo. Kuraĝaj homoj riskas sian kapitalon por la afero. Kaj la librojn ja aĉetas esperantistoj.

Sed lastatempe, en la movado ĝenerale, vidiĝis certa ekvelko de la recenzemo. Eble nur "Heroldo" vere klopodas recenzi ĉiuj aperintajn verkojn; la revuo *Esperanto* ja mencias ĉiujn, sed recenzas nur elektitajn titolojn. Kaj tiu fakto, tiu ekvelko, efektive malhelpas efikan disvendadon de la aperintaj libroj—kiel, finfine, oni aĉetu librojn neanoncitajn, kaj kiel juĝi la valoron de anoncitaj verkoj sen kelka atentigo far recenzoj?

Pro tio, do, la BE daŭrigas sian tradician rolon sur tiu ĉi kampo. Kaj ĉifoje kun eĉ pli da fiero ol kutime, ĉar jen ni prezentas al vi seson da libroj, kiu iel tuŝas nin kiel britojn: ili estas kontribuoj de aŭtoroj, tradukintoj kaj aŭ eldonistoj britaj. Ĉu ni ne pravas, traktante iom serioze tiun seriozan laboron de britaj esperantistoj?

NOVAJ LIBROJ

Skota Antologio. Antaŭparolo de William Auld. Ilustrita de Ruth Goodheir. Eldonejo Kardo 1978, 255p. broŝ. Prezo: £3.20.

En sia Antaŭparolo al ĉi tiu kolekto da skotaj verkoj William Auld atentigas: "Skotlando restas kulture, jure kaj religie aparta de siaj sudaj najbaroj—kion alilandanoj ne ĉiam bone komprenas." Multe da angloj, certe, ne komprenas— aŭ almenaŭ ne agnoskas—tiun apartecon de la skota popolo. Ili kredas, ke ĉar

Robert Louis Stevenson, John Buchan kaj aliaj ŝatataj aŭtoroj verkis angle, ili estis angloj. La Antaŭparolo prezentas tre utilan, koncizan historion de la lingvoj kaj literaturo de la skota popolo.

Skotlando estas vere du landoj de aparta evoluigo kaj vivmaniero. La harditaj klanoj de la montoj, kaj la egale fortikaj paŝtistoj kaj marĉandistoj de la sukherbaj ebenaĵoj, tamen ne restis tute apartaj. Ambaŭ regionoj estis regataj de la sama skota reĝo; la klanestroj prezentis sin en la kortego kaj la klananoj en la ebenaĵaj vendejoj.

Elekti erojn por antologio estas malfacile, sed kiam la literaturo de popolo estas tiel riĉa kaj abunda, tiel longe establita, tiel diverslingva kaj diversspeca, la fina elekto estas nepre malfacilega. La kompilinto(j) gratulindas. La gamo etendiĝas de John Bellenden (1495-1559) ĝis Alexander Scott (nask. 1920). La tradukintoj—Auld, Dinwoodie, Francis, Goodheir, Kennedy, Martin kaj Rossetti—garantias la altan nivelon de la Esperanto, kiu kaptas la stilon de ĉiu peco.

Pli detale. La *Universala Lingvo* de Sir Thomas Urquhart (1613-1660!) ne povas ne interesi Esperantistojn; ankaŭ lia koncepto pri universala alfabeto. Preskaŭ ĉiu grava 'brita' filozofo estas skota, kaj la ero de David Hume pri la homa naturo estas tipa de la klara kaj konciza rezonado de la skota skolo. John Buchan, Carlisle, Stevenson kaj Robert Burns estas vaste konataj, sed ĉi tie ankaŭ troviĝas aliaj verkintoj egale famkonataj kaj ŝatataj inter la skotoj. Inter tiuj estas Niel Munro, kies *La Perdita Pibroĝo* prezentas perspektivon en aspekton tre gravan de la skota psikologio; la skotoj, krom sia raciema kaj malfantazia humuro, havas grandan kapablon *sopiri*, en maniero tute ne angla, sen perdo de la vira 'malmoleco'.

Inter la poemoj de Burns kaj aliaj troviĝas poemo bone konata en la gaela lingvo, *Virin' Gaela* de Sorley Maclean, trafe tradukita de Auld.

Ĉi-lastaj iom reliefigas la mankon de klarigaj notoj. Mallonga noto pri, ekzemple, la Senhomigado de la Monta

Regiono, la iama malfido inter montano kaj ebenajano, kaj la religi-politika signifo de la Bela Princo Karlĉjo multe helpas samideanojn. Rilate al la *Virin' Gaela*, eble helpus iometon scii pri la sorto de tiaj mizeruloj, kiujn premis kaj eklezio kaj bienposedanto. Ŝi estas ne nur universala, sed ankaŭ skota.

Certe kritikendas la manko de unuformeco de ortografiado de gaeldevenaj nomoj—Glencoe, sed Lofhòu, en la sama rakonto. Kaj kiel alilandanoj traktu Maknaughton (jes!)?

Sed mi ne ĉikanu. Ja bona, fidinda, kaj ege interesa antologio skota. Forte rekomendita.

D. S. Lord

Praktika Bildvortaro de Esperanto. "Language Services", Oxford University Press, 1979. 87 paĝoj (plus kelkaj blankaj por notoj). £1.95. Aĉetu en Britujo rekte de: Language Services, 17 High Street, St. Peter's, Broadstairs, Kent.

Tiu esperantisto, kiu sin kaŝas malantaŭ nura nomo de firmao, faris, per privata iniciato, servon kiu povas esti epokfare grava kontribuajo al la instruado de Esperanto: por ĉiuspecaj lernantoj, sed eble plej valore por lernantoj ne jam kleraj; izolitaj aŭto-didaktaj; lernejoj; kaj homoj en la Tria Mondo kaj en aliaj landoj, kie oni ne povas facile akiri multajn librojn kaj vortarojn.

La estro de "Language Services" entreprenis ion vere sagacan kaj ekonomian; faris aranĝon kun la mondfama, altprestiga eldonejo, Oxford University Press (jam fama parte pro grandskala eldonado de lernolibroj por aliaj landoj); kaj uzis la jam lerte elektitan kaj laŭ pedagogiaj bezonoj desegnitajn kolorbildaron de la *Oxford English Picture Dictionary* (1977), sed kun esperantaj vortoj. La mallongan prozaĵon sur p. 79, kiu ekzemplas la uzon de pronomoj, li lerte anstataŭas per eta teksto, multe pli interesa kaj amuza, kiu ekzemplas pronomojn kaj ankaŭ korelativojn; ĉar Esperanto ne bezonas la notojn pri fonetiko aŭ la fonetikan indkson, kiujn

bezonis la angla vortaro, li trovas spacon ankaŭ por la korelativa tabelo; literuma alfabeto kun klarigoj; listo de dudek-naŭ landoj kun la ĉefurboj kaj valutoj; paĝo de proverboj kaj parolturnoj; informoj pri UEA kaj ĝiaj servoj; kaj komercaj informoj por aĉetado de la libro mem.

La sola malavantaĝo de la brile elpensita procedo estas, ke, pro facile kompreneblaj teknikaj kaŭzoj, anglaj vortoj kelkloke restas en la bildoj. Tio apenaŭ gravas kaj certe ne malhelpas lernanton. Kvankam la elektado de bestoj, plantoj kaj ŝipoj estas sufiĉe internacia, kaj multaj objektoj estas uzataj tra la tuta mondo, tamen ege valora libro estus eĉ pli valora, se estus praktike eble (kiel ja ne estis) montri pli da objektoj ekstereŭropaj; kaj ĝuste en tiuj landoj, kie la libro povos esti plej helpa, oni eble rimarkos iom ironie la luksecon de okcidenteŭropa vivostilo. Sed la estro de "Language Services" entreprenis la eblan; kaj tiel ege utilis al Esperanto; sopiri al la neebila multe malpli helpus.

La libro estos utila al la plej novica lernanto, kiu povos el ĝi facile lerni valoran vortaron, tre rilatan al la bezonoj de la ĉiutaga vivo, kaj sen la eblecoj de miskomprenoj, kiujn prezentas senbilda vortaro al nespertulo. Sed ĝi estos utila ankaŭ al multaj vere spertaj esperantistoj, kaj certe troviĝos inter miaj multaj konsultlibroj; ĉar ofte estas ĝuste iu vorto "ĉiutaga" kiun ni neniam antaue uzis kaj subite bezonas. (Ke ia fako ne koncernas min, ne garantias, ke fremda vizitanto ne faros demandon pri ĝi.)

Estas iom strange, ke pluraj tute ĉiutagaj aferoj prezentis problemojn; nu, en Esperanto ni havas valoran literaturon, sed ankoraŭ ne gazeton pri mastrumado aŭ raportojn pri sportoj! Kredeble neniu povos kompili esperantan vortaron, kiun iu alia ne kritikos pri kelkaj punktoj. Estis tre grave, ke la *Bildvortaro* estu kiel eble plej vere internacia, uzante la plej ĝenerale akceptitajn vortojn; kaj la kompilinto nepre ne laboradis facilanime aŭ kaprice, sed konsultis multajn vortarojn kaj fakulojn. Tamen, oni ne povus lasi bildon sen ĝia

rilata vorto, do finfine necesis decidoj. Sur p. 85 ni trovas klarigon pri tiuj nur 22 vortoj, plus kelkaj loknomoj, pri kiuj povas esti veraj duboj . . . 22 el preskaŭ 2000 vortoj; la kompilinto citas siajn fontojn. Se mi sentas dubojn pri kelkaj vortoj, vere malmultaj, ekzemple *doso* por ladskatolo enhavanta trinkaĵon, kaj (kredeble la plej duba punkto en la verko) *necesabo* analogia al *lavabo*, mi ne povas proponi pli bonan alternativon; kaj se sufikso *abo* ĝenerale adoptiĝos por "instalajo" ĝi estos ofte utila, precipe por teknikistoj.

Sufiĉe pri lupea serĉado de etaj neperfektaĵoj. Estas devo de recenzisto, atenti ilin; sed estas mia pli grava devo, atenti la esperantistojn, ke jen io okazis, kio vere plifaciligos lernadon, instruadon, kaj praktikan ĉiutagan uzadon de Esperanto. Laŭdon meritas ne nur la vortaro kiel vortaro, sed la tuta entrepreno, kiu sendube postulis bonegan diplomatecon, sagacajn antaŭpreparojn, kaj financan aŭdacon kiun mi apenaŭ kuraĝas pripensi. Ni malofte ricevas tiel eminentan ekzemplon de tio, kion unuopa persono povas kontribui al nobla celo, se tiu unuopulo vere serĉas sian propran kontribuokapablon.

Marjorie Boulton

Pri lingvo kaj aliaj artoj, de William Auld. TK-Stafeto 1978, p.212. Prezo: £5,15.

La kernaj studoj el la 15 eroj de ĉi libro estas: 'Mitoj kaj faktoj pri Esperanto', 'Esperanto kiel literatura lingvo', 'La evoluo de la esperanta poezio', 'Pri la tradukado de poezio', kaj 'La internacia lingvo kiel belarta tradukilo'. La aliaj eseoj pritraktas aŭ temojn pli ĝeneralajn aŭ trajtojn pli specifajn, ĉefe pri lingvo, ne multe pri aliaj artoj. La rezulto, unuforme anoncita antaŭ kiom da jaroj, sed nun des pli aktuala, estas certe la plej grava esearo depost 'Lingvo kaj Vivo'; kaj pro du ĉefaj kialoj.

Unuavice, ĉiu paĝo de vigla k valida rezonado estas kvazaŭ saĝujo de argumentoj kiuj sinsekve trafas la celtabulon. Ĉar Auld estas preskaŭ profesia praktikanto de la lingvaj artoj, kaj ĉar li estas

tre konscia kaj komprenema pri la fenomeno lingvo kun ties psikologia funkciado, li kapablas esplori kaj tezi tra la tereno kun iom da firmeco kaj aŭdaco. Efektive dum la lastaj jardekoj la lingvo fariĝis en multaj fakoj kreaj kaj analizaj ne plu io 'travidebla', aŭ por tiel diri ia neŭtrala rekta peranto de realo, sed mem studobjekto per kiu oni komprenu, ekz-e, kiel ni konstatas la mondon. Kaj proprafake Auld estas duoble konscia, kiel artisto per esperanto, ke la fenomeno esperanto povas prilumi multajn facetojn de nia lingvouzado. Tial, kiam li traktas ekz-e tradukadon, lia sperto kiel esperantisto donas al li ian kontrolon pri kutimaj teorioj, tiel ke ni vidas ke ĝisnunaj diskutoj estas foje limigitaj ĝuste pro manko de la esperanta dimensio. Elstare kvalita estas ankaŭ la ĝusta proporciado inter ĝeneralaj proponoj kaj detala ekzempligo, kaj la trafa elekto de ilustraj ekzemploj, des pli se el fonto esperanta.

Sed la dua trajto de la esearo rilatas ne la metodon sed la celon, verdire la ideologion. Oni emas diri, laŭ Waringhien, ke la originalaj kontribuoj de esperanto al la mondo estas du, nome la originala poezio kaj la sennacismo. Ĝis mi relegis la libron mi ne konstatis, kiel intime ligitaj tiuj du estas ĉe Auld. La esperanta poezio intertempe vastiĝis al la esp-a literaturo, efektiva kulturo, kiu evoluigis tia, ĉar ĝuste ĝiaj partoprenantoj kapablas pli plene atenti la similecojn inter la homoj. Kaj la sennaciismo? Nu, mi diru, ke esperanto implice redifiniĝas kiel dekokjarcenteca klerisma (k kleriga) movado per kiu ni povas sendogme eliri el la konfliktigaj ismoj kiuj ankoraŭ furoras. Kaj kvankam sennaciismo ŝajnas difino negativa, ĉar kontraŭa al iu specifa ismo, vere ĝi implicas pozitivajn valorojn (samkiel la interna ideo). Tiuj valoroj respeguliĝas en la internacia kulturo, kaj do la originala literaturo estas la avangardo de la esperantistoj.

Ĉar Auld havas tiun kredon pri la kultura rolo de esperanto, la esearo estas tute konsekvenca, ĉu li analizas unu tradukon, unu poeton, unu faceton de la

lingvo, aŭ alfrontas pli larĝajn temojn. Ĉiam, en kiu ajn entrepreno, esperanto estas egalrajta lingvo kaj kulturo kun specifa kaj grava rolo. Kaj for el liaj paĝoj falas senaplobigite la solecismo, antaŭjuĝoj, misrezonoj, falsaj analogioj, nudaj stultaĵoj, superecaj sintenoj, facilanimaj asertoj kaj aliaj behinaĵoj de 'ĉiu muknaza bubo aŭ orgojla filologo'. Ĉar vere estas, ke por ion trafan diri *pri* lingvo ĝenerale, necesas multe pli ol simple esti kapabla paroli ĝin. Sed por ion veran diri pri esperanto, tio estas ja minimuma antaŭkondiĉo. Se temas aliflanke pri aŭtoro kun iom ampleksa krea sperto kune kun radikala ideara starpunkto, vi havas riĉe interesan verkon.

N.T.R.S.

La turoj de l' ĉefurbo, de Mauro Nervi. Esperantaj kajeroj, Manĉestro, 1978. 120p. Prezo: £2,70.

Jen surpriza, neordinara kaj elstara libro. Surpriza, ĉar la unua elpaŝo de nova juna talento ĉiam surprizas. Neordinara laŭ enhavo, laŭ la nivelo de la stilo kaj lingvaĵo, kaj, plej impone, pro la fekundeco kaj riĉeco de la figuroj kaj metaforoj. Elstara, kaj pro la kvalito, kaj pro la apero de nova voĉo, kiu jam promesas havi simile grandan influon niaepoke kiel siatempe havis Kalocsay.

Eĉ la formo de ĉi tiu libro estas nekutima kaj pri tio oni povas esprimi iom da miro, eĉ dubo. Certe ĝi apenaŭ aperus ĉienhave ie krom en Esperantujo. Kie en nacia vesto oni renkontus, kiel unua libro de nova aŭtoro, kolekton da poemoj, kelkajn novelojn, du teatraĵojn kaj kritikan eseon, ŝajne hazarde kunmetitajn inter du kovriloj? Ni iom pli detale ekzamenu ĉi tiun enhavon, do.

Unue, oni tuj konstata ke alfe kaj omege Nervi estas poeto. Ĉu li verkas poemon, ĉu novelon, ĉu dramon, li pensas kaj esprimas sin poezie kaj pro tio atendas de la leganto la komprenemon, sentivon kaj paciencon kiuj kree respondos al la bildoj kaj metaforoj, kaj elserĉos sian propran signifon el obskura frazo kie la senco kuŝas je nivelo tro pro-

funda por proza analizo.

Se vi ne kutimas legi nuntempan poezion mi konsilas ke vi preparu vin per unua legado de la eseo, 'Pri moderna poezio', en la fina sekcio. Tiel, komencite je la fino, vi pli facile reiros al la komenco kie atendos vin kvin poemoj ("Kanzonoj") sekvate de kvar noveloj, el kiuj tri estas rakontoj, sed unu estas kvazaŭ serio da poeziaj parabolaj bildoj en proza formo. Post la noveloj lokiĝas la kerno de la libro, aro da 32 poemoj, inter kiuj estas la jam premiita poemo kiu donas titolon al la libro.

Tiam sekvas alia surprizo: la unua teatraĵo estas kvazaŭ klasikajo, kaj pro ĝia stila fideleco al ĝiaj antikvaj grekaj fontoj, kaj pro la preskaŭ zamenhofa lingvaĵo. La dua, tamen, ankaŭ jam premiita, replongigas nin rekte en la ĉefluon de dudekjarcenta poezio kaj dramo. Post tio restas la kritika eseo, kiu komentarias la duan teatraĵon, kaj fina instiga poemo.

Pri la prezento de la libro sufiĉas rimarki ke la supra aspekto estas alloga, digna kaj taŭga, sed la bindado estas laŭ tiu moderna kungluita speco kiu unue insiste refermas la paĝojn dum legado, krom se oni rigide tenas ilin, sed iom pli poste kompense permesas al ili unuope elfali.

Resume, mi certigas al vi ke ĉi tiu estas tre grava libro. Mi ankaŭ garantias ke vi ne pentos la elspezon da mono por aĉeto kaj da tempo kaj peno por plene alproprigi ĝin. Ke vi trovos ĝin facila legado, tion mi tute ne povas prognozi.

David Hill.

Laŭkazaj Lingvaj Notoj de Avo /Alec Venture/. Brita Esperanto-Asocio, 1977, 95 p., broŝurita, 21 x 15 cm., £1.70.

Laŭkazaj Lingvaj Notoj estas kolekto de prilingvaj artikoloj el la samtitola rubriko aperinta dum la pasintaj dek jaroj en *The British Esperantist* kaj *La Brita Esperantisto*. La enhavo, tuŝanta gramatikajn kaj semantikajn demandojn en la uzo de Esperanto, estas aranĝita laŭteme. Faciligas konsultadon indeksa listo de anglaj vortoj, kies traduko estas pritrak-

tita en la libro. Kvankam pluraj notoj temas pri malĝusta lingvouzo ce angleparolantaj esperantistoj, ankaŭ alilingvanoj povas profiti de la diskutoj.

Laŭgenre *Laŭkazaj Lingvaj Notoj* envicigas inter aliaj similaj libroformaj kolektoj de prilingvaj demandoj, kiujn iniciatis d-ro Zamenhof per sia klasika *Lingvaj Respondoj*. Menciindas ankaŭ *Esperanta Mozaiko* de F. Faulhaber kaj la ĵus eldonita *Lingvaj Anguloj* de F. Baronnet.

S-ro Venture ĉerpis la erarajn vortojn kaj frazojn ilustrantajn liajn artikolojn el publikigaĵoj kaj ankaŭ el la parola lingvo. Li pravigas siajn ĝustigojn, citante la zamenhofan lingvouzon, gramatikajn klarigojn en *Plena Gramatiko* kaj difinojn en *Plena Vortaro*, *Plena Ilustrita Vortaro* kaj kelkaj nacilingvaj Esperanto-vortaroj. Kiam ne eblas trovi kontentigan respondon surbaze de la menciitaj aŭtoritataj konsult-libroj, li invitas legantojn, precipe tiujn, kies gepatra lingvo ne estas la angla, proponi pli trafajn solvojn.

La verko povas servi kiel studlibro por progresintaj lernantoj, reliefigante lingvajn problemojn, jen ne sufiĉe detale prezentitajn, jen tute preteratentitajn en lernolibroj. Mi trovas, ke ĉiuj verkoj enhavantaj lingvajn demandojn kaj respondojn pritraktas similajn temojn, sed mankas tipologio de eraroj kaj analizo de iliaj kialoj. Tre bezonata por instruaj celoj estas la "gramatiko de eraroj" en Esperanto. La du ĉefaj tipoj estas universalaj eraroj kaj limigitaj eraroj. La unuaj rezultas el gramatikaĵoj egale malfacilaj por parolantoj de plej diversaj lingvoj: la refleksivo, la adverba participo, la transitiveco de verboj, la akuzativa kazo, la *po*-esprimo. Limigitajn aŭ naciajn erarojn okazigas ĉefe diferencoj inter Esperanto kaj la gepatra lingvo de la lernanto: la difina artikolo, prepozicioj, verbaj modoj kaj tensoj, la signifo de internacie uzataj radikoj. S-ro Venture dediĉas preskaŭ sep paĝojn al la refleksivaj pronomoj en Esperanto. Okaze de dubo pri la ĝusta uzo de *li* aŭ *si*, li konsilas al la lernanto reformuli la

frazon kaj poste kontroli ĝin per reguloj. Nu, tio ja eblas, kiam oni sidas ĉe skribtablo, sed kiel oni povas fari tion interparolante aŭ prelegante?

Ampleksa estas ankaŭ la diskuto pri la universale erara uzo de transitivaj kaj netransitivaj verboj. "Estas evidente, ke iuj uzantoj de la lingvo ne perfekte scias, kiuj verbradikoj estas transitivaj . . ." skribas s-ro Venture. La kaŭzo de tiu neperfekta scio estas la manko de indikilo pri transitiveco en la Esperanta verbradiko. La sola maniero ekscii pri la naturo de iu verbo estas konsulti vortaron. Tiun konsilon donas *Plena Gramatiko*. Sed kiun vortaron? Ne ĉiuj akordas!

Grava tasko por fakuloj pri lingvo-instrua metodologio estas kompili konkordancon de eraroj pritrakitaj en la verko de s-ro Venture kaj tiuj de ĉiuj aliaj aŭtoroj okupiĝantaj pri la sama problemo, por ellabori la gramatikon de eraroj kaj poste evoluigi instrumentadojn, kiuj venkos tiujn malfacilaĵojn en la plej facila lingvo. S-ro Venture montras unu eblecon en sia klarigo pri la uzo de *po*. Estas tre facile eviti tiun gramatikan stumbligilon, se oni ŝanĝas la frazon. Tiu procedo verŝajne jam enradikiĝis en la parola lingvo, ĉar *po* tre malofte aŭdiĝas, kompare kun ties universala misuzo en la skriba lingvo.

Pluraj aliaj temoj en *Laŭkazaj Lingvaj Notoj* instigos esperantistojn cerbumi kaj diskuti pri lingvaj problemoj.

Bernard Golden

Enkonduko en la originalan literaturon de Esperanto. de William Auld, En konduka eseo kaj bibliografio de Reinhard Hauptenthal. Artur E. Iltis, Saarbrücken 1979. 101 p. Prezo: £3.25

Jen kvin prelegoj, kiujn faris la aŭtoro en Sarlando en 1977. Ili donas ne nur enkondukon en nian literaturon, sed ankaŭ skizon de ĝia historio. Auld klarigas ke Esperanto rajtas esti nomata artefarita, ĉar ĝi estas kreaĵo de artisto, kaj ke tio estas la ĉefa faktoro kontribuanta al ĝia sukceso kompare kun la kompleta fiasko de multaj aliaj projektoj.

Zamenhof, laŭ Auld, neniam pretendis esti objektiva; li estis emocie ligita al la interpopola kompreniĝo. Sen emocio ne ekzistas literaturo, kaj sen literaturo ne vivanta lingvo. Ekde la komenco Zamenhof poeziis, originale kaj traduke. Auld montras, ke la esperantistoj ĝenerale sentas emocian ligitecon al sia afero kaj multaj elverŝis siajn sentojn per la kreado de literaturaj verkoj. Oni povus aldoni ke kelkaj esperantistoj, kaj ne la malplej gravaj, venis al Esperanto pro ĝia literaturo.

Auld citas Rakitski, kiu jam en 1901 skribis, ke unu originala verko valoras pli ol dek plej bonaj tradukoj. Li tamen komentas, prave, ke ankaŭ tradukoj gravas. Kelkaj diris pli, kaj opiniis ke la ekzisto de ĉefverkoj tradukitaj en Esperanto multe kontribuas al la prestiĝo de la lingvo. Mi dubas. Ĉu la nederlanda lingvo havas prestiĝon, ĉar ĝi havas i.a. kelkajn bonajn Ŝekspir-tradukojn? Laŭ mi apenaŭ iu ne-nederlandano scias aŭ volas scii pri tio, kaj same estas pri Esperanto. Sed laŭ mi tradukoj treege gravas, ne el prestiĝa vidpunkto (iom duba afero ĉiuokaze!) sed por doni al tiuj, kiuj jam komencis lerni la lingvon, kialon por daŭrigi. Kelkaj el ni lernis, preskaŭ perdis intereson, kaj revigliĝis leginte bonajn tradukojn, kiuj montras ke Esperanto estas vera lingvo.

Unu aferon Auld ne pritraktas: la influon de alilingva literaturo, ne necese de la nacia lingvo de la verkinto, ĉar la plej-parto de homoj kun intereso pri literaturo povas legi pli da lingvoj ol sia propra (kvankam tio ne pravas pri Britujo kaj Francujo). Neniu dubas ĉu la japana literaturo influis japanajn esperantistojn; ĉu vere iu eŭropa poeto povus verki sen esti influita de eŭropaj poetoj? El la influo ne ĉiam rezultas imitado; la rezulto ankaŭ povas esti: "mi faros alimaniere".

La dua prelego, kiu pritraktas la originalan literaturon, ne intencas doni katalogon de aperintaj verkoj (oni trovas tiun i.a. en "Esperanto en Perspektivo"), sed donas "superrigardon . . . kiu kritike elpinglas la ĉefajn verkojn". Zamenhof estis iniciinto ne nur de nia lingvo, sed

ankaŭ de nia poezio. Jam en la frua periodo aperis gravaj poetoj, kaj prozistoj kies verkoj restas legindaj, sed post la unua mondmilito nia poezio atingis plenkreskon. Aperis kvin ĉefaj poetoj: Miĥalski, Kalocsay, Baghy, Schwartz kaj Hohlov.

Pri la revuo "Literatura Mondo" kaj ĝia redaktoro Kalocsay temas la tria prelego, kiu ankaŭ pritraktas la influhavan "Parnasan gvidlibron" aperintan en 1932. "Dank" al Kalocsay la diletantismo definitive malaperis el nia poezio" (Estas iom amuze ke antaŭ nelonge artikolo en "Esperanto" nomis Kalocsay "kolosa diletanto"). "Streĉita kordo" de Kalocsay estas la elstara verko de tiu periodo, "unu el la ŝlosilaj verkoj de nia lingvo".

Prelego IV temas pri originala prozo 1930-1977; ĝi mencias dek kvin gravajn prozistojn. Ĝi incitas al legado de multaj, almenaŭ al mi nekonataj, verkoj. Ĝi temas pri fikcia prozo; la nefikcia ricevas nur unu paragrafon. Tamen bonan stilon, kaj tio simple signifas ke la verkisto havas ion por diri kaj scias kiel diri ĝin, oni trovas ne nur en romanoj kaj noveloj. Aŭ mi diru: trovu? Peza, teda stilo ne atestas klerlecon; oni povas lerni de Descartes, Gibbon aŭ Carlyle, ke eblas verki pri temoj el filozofio aŭ historio sen pensigi la leganton pri homo dancanta en sirupo.

La lasta prelego temas pri originala poezio 1950-1977. Ĝi kompreneble komenciĝas per Kvaropo kaj la tiel-nomata skota skolo (kiu fakte neniam estis skolo). La kvar poetoj honoris Kalocsay, sed iris siajn proprajn vojojn, kiuj estis tre diversaj. Post Kvaropo debutis Marjorie Boulton, nia elstara poetino, kaj en 1956 aperis "La infana raso" de Auld, epopeo pri la ekzisto de la homo en spaco kaj tempo, inspira verko, kiu plene utiligas le eblecojn de nia lingvo. Auld mencias sep nuntempajn poetojn. Ĉu iu el ili, aŭ ĉiuj kune, "vojmontras al nova epoko de nia kulturo?" Espereble.

Leginte la libron oni iom hontas recenzi: ekzistas tiom da legindaĵoj, kiujn mi neniam legis! Se Auld farus nenion

krom atentigi pri ili, ni ŝuldu dankon al li, sed li faris pli. Post legado oni konscias ke nia originala literaturo estas mirinda fenomeno, ne facile klarigebla. Laŭ mi ĝi provas, unue, ke nia movado estas rezistmovado; ĝia ekzisto estas protesto kontraŭ la moderna tencenco uzi lingvon ne por interŝanĝi ideojn sed por krei sloganojn, kaj formikigi la homon en la nomo de ideologioj bazitaj sur deknaŭjarcentaj ideoj. Due, ĝi estas renesancmovado; ĝi atestas kredon pri io, kio ekzistas sendepende de epokaj aŭ naciaj diferencoj, alivorte de io klasika inda je revivigo. Ĉi tiun libron oni donu al novaj esperantistoj, por sciigi al ili ke Esperanto enhavas neelĉerpeblan trezoron.

Albert Goodheir

PRI LA KOSTOJ DE LIBRO-ELDONADO

Ĉiuj konsentos, ke libroj multe kostas nun. Sed iuj kostas pli ol aliaj. Kial?

Kion, aĉetante libron, oni aĉetas? Krom paperon oni eble pagas al aŭtoro (sed E-verkintoj neniam profitas!), profitigas eldoninton (se jes, kiel li elspezos la profiton?) . . . aŭ ebligas propagandon.

Multe da propagando nenion kostas al eldoninto. Li devige sendas libron al la Brita Biblioteko (ho ve! nur brite eldonitajn E-aĵojn ĝi havas!), kaj tiel ĝi ekzistas al fakuloj (en katalogo, eventuale en bibliografioj)—sendepende de verk-kvalito, prezo kaj aspekto, ĉar karto en katalogo ne montras tiujn! Li sendas ekzemplerojn al gazetoj por recenzo (al movadaj, por helpi lin diskonigi kaj disvendi la libron, kaj espereble ankaŭ al taŭgaj nacilingvaj—aĉetantoj ne plendu se tio plialtigas la prezon iomete!) kaj al aliaj bibliotekoj (movadaj kaj fakaj).

Kiel krome libro propagandas? Kiel io bel-aspekta, kiel “sur-kaftabla” libro: oni aĉetos (ne legonte!) por impresi la amikojn. Do refoje ne gravas, ĉu bone verkita; sed nun ja gravas la aspekto.

Pensigis min pri tio “De tempo al tempo” de Giorgio Silfer: ĝi enhavas

proksimume tiom da poezio, kiom mi presigas sur A4-folio por disdoni, sed sur grandaj dikaj paĝoj kun kelkaj vortoj en angulo ĝi kostas preskaŭ £4. Kiom da senmonaj poetoj aĉetos ĝin? (ne ĉiuj havas amikojn kun kaf-tabloj!). Kaj jen bonega nova romano “Ventoj”, tradukita de Josip Velebit (100-paĝa, ofsete presita, kelkpaĝe apenaŭ legeble—sed kun bela kovrilo) kostas pli ol £4 (SATEB vendas ĝin je £1.25—senpaga reklamo!). Dum mi proponas novajn libretojn je 25p kaj 30p (= pres-kosto/ (nombro presita minus nombro sendita al bibliotekoj kaj gazetoj)). Ĉu mi estas stultulo, kiu ne helpas kaftable-propagandantojn?

Resume, pri libro gravas ĝia

—verk-kvalito (nur al tiuj, kiuj povas legi; malmulte kostas presigi tekston!)

—ekzisto (kiel katalogero — apenaŭ kostas)

—aspekto (kiel logilo—multe kostas!)

Ĉu ĝusta analizo? Se ne, kritikue. Se jes, kiel ĝi influu nian eldonadon?

Kris Long

INTERNACIA FERIA ALTLERNEJO

La someran sesion de IFA 1979 inaŭguros la faka kolokvo pri porinfana literaturo (2an-4an de junio), sed ĝi komenciĝos efektive la 8an de julio kaj daŭros ĝis la 24a de aŭgusto, kun paŭzo dum la UK-semajno. La kalendaro proponas dek-du aranĝojn, el kiuj du semajnaj kursoj por progresantoj (gvidos Perla Martinelli), du semajnfinaj seminarioj kaj ok semajnaj kursoj por fluj parolantoj, pri plej diversaj temoj. Inter la lekcioj oni trovas la nomojn de popularaj esperantistoj kiel Piron (psikologio) kaj Triksini (Biblio), de fakuloj kiel Carlevaro (Volapük) kaj Pennacchietti (kompara lingvistiko), de junaj intelektuloj kiel Lindstedt (ĝenerala lingvistiko) kaj Silfer (literatura kritiko/establotekniko), kaj de protagonistoj de la KCE-aktiveco: August Braun (astronomio) kaj Claude Gacond (pedagogio/turismo).

Por informoj: IFA, CP 771, CH-2301 La Chaux-de-Fonds (Svislando). Bonvolu aldoni du internaciajn respondkuponojn.

ANONCETOJ

3p por ĉiu vorto. Minimume 45p. Antaŭ-pagenda.

Mi tre deziras havigi la 1978-an Bulgaran Esperanto-poŝtmarkon uzitan kaj/aŭ ne neuzitan. Nesbitt, Roselands, Ambleside, Cumbria.

INTERNACIA LIBRO-KLUBO ofertas plej bonajn Esperanto-eldonojn je favoraj prezoj. Aligo senpaga. Sendu afrankitan koverton por detaloj: 46 Lea Crescent, RUISLIP, HA4 6PP.

40-aĝa flegistino (alteco 1.58m, pezeco 52kg, bruna hararo, nigraj okuloj) deziras anglalingve korespondi tutmonde kun viroj inter 40- kaj 45-aĝa edziĝcele. Interesoj: kino, teatro, literaturo. Kristina Raŭĉeva, ul. Aleŭ Vuzrazhdene 38g, Blok Trakia Vxod B Etazh 4, gr. ROUSSE 7000 Bulgaria.

Kio estas SAT? Sennacieca Asocio Tutmonda bonvenigas informpetojn. Informiĝu ĉe: SAT en Britio, 29 Farrance Road, Chadwell Heath, Essex, RM6 6EB.

Are you using your insurance to help Esperanto at no cost to yourself? If not, please write to G. D. Carter, 51 Wyche Road, Malvern, Worcs.

You could set up a Special Memorial Fund within the Norwich Jubilee Esperanto Foundation which would provide the gift of a Book or a Travelship and thus provide a permanent Memorial to yourself, your dear one, or your great friend. Particulars from Norman Williams, M.A., B.Sc., 237 Two Trees Lane, Denton, Manchester, M34 1QL.

SCOUTS! Join the Scout Esperanto League. Enquire 21 Brookfield Avenue, Waterloo, Liverpool, L22 3YE.

MOTORISTS! Join the International Motorists Club (IEKA). Life Membership £1.65. British Representative: J. Brownlee, 20 Sunnyside Gardens, Upminster, Essex, RM14 3DS.

David G Valecillos V., Calle 79 No.3C-72, Maracaibo, VENEZUELA. volas korespondi kun anglaj samideanoj pri ĉiuj temoj. Li estas junulo kaj petas sendon de malnovaj libroj kaj gazetoj por uzo de malriĉaj kursanoj.

Anti-Ro Attitudes

NATIONAL ATHEISTS who believe that the human race is rightly "culled" by war, and who therefore accept the possibility of atomic destruction, logically oppose Ro.

OTHER ANTI-RO ATTITUDES often result from lack of integrated thought. This can be remedied by reflection.

ON WHAT IS YOUR ATTITUDE BASED? Do you oppose Ro World Government because you consider the absorption of the many into one an impossibility? But it has actually occurred over and over again throughout history e.g. in England in the 10th century, in N. America (formation of U.S.A.) in the 18th century. Do those who admit such developments regret them and wish to go back to former disunity? Is it that they believe unity right when achieved but wrong when attempted? Perhaps they swallow the silly Communist claim that a World State must be Communist. If a Communist World State develops, whose fault will it be now that Ro is here as the sensible alternative to Anachronistic Atheist Nationalism?

Ro is short for
Regnego. Write for
The Mitchell Report.



The Ro Organizer,
BM/World State House,
London W.C. 1.